Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 26-an de oktobro 2017 per Skype

Partoprenis:
Mario Machlik en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Lars Sandbakk en Sandnes
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim.

0. Tagordo
Aprobita

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 21-an de septembro
Aprobita

2. **Ekonomio**
Skagen høyrente: 131.874,- (131.786,-) *Skagen Vekst*: 62.050,- (59.319,-)

3. Farendaĵoj post la Landa Kunveno, protokolo
La protokolo aperis en Norvega Esperantisto nr-o 5, ni devas afiŝi ĝin ankaŭ en nia retejo. Anne Karin sendos la protokolon por subskribi al Amelie Matt kaj Herman Ranes. Poste ni povos registri la novan estraron de NEL kaj de legaco Uhlen ĉe *Brønnøysundregistrene*.

4. Ekzameno en Norvegio?
Post la respondo de Otto Prytz (gvidanto de la ekzamena komisiono) ni konkludis, ke ni ne havas forton krei novan ekzamenan sistemon en Norvegio. Ni devus plie prioritati la instruadon de Esperanto. Por eventualaj ekzamenemuloj ni proponos fari KER-ekzamenon. La estraro esploros pli pri tiuj ekzamenoj kaj pri tio kiel ni povus organizi ĝin en Norvegio.

5. Skandinava kongreso 10a -13a de majo 2018
NEL kune kun la sveda kaj dana esperanto-organizoj aranĝos trilandan renkontiĝon pro la 100-jara jubileo de la Unua Skandinava Kongreso. La evento okazos en ŝipo de *DFDS*, kiu veturos de Kopenhago al Oslo kaj reen. Oni havos ekskurson en Oslo (la 11-an) kaj en Kopenhago (la 12-an). En Oslo laŭ la propono oni promenos de la haveno al *Akershus festning* kaj poste al *Oslo Rådhuset* kie oni povus havi turisman gvidadon, oficialan akcepton kaj eĉ lunĉon en la kafejo. Poste en la ŝipo oni havos komunan aranĝon pro la jubileo ekde la 14-a horo, malfermite ankaŭ al tiuj kiuj poste ne vojaĝos plu al Kopenhago. Revenante el Kopenhago NEL disponos konferencan salonon en la ŝipo (inter la 14-a kaj 17-a horo) kaj tiam ni provos aranĝi nian tradician seminarion. Unu el la eblaj gastoj povus esti Kim Henriksen (fama dana e-muzikisto) kaj unu el la eblaj temoj povus esti, “kiel ni amuziĝu pere de E-o?”, Mario povus kontribui al la temo prelegonte pri sia vojaĝo en Japanio. Ni esperas, ke ni povus per Skajpo ankaŭ tiujn grupojn, membrojn kunligi kiuj ne povos ĉeesti en la ŝipo.

6. Agado en *Facebook*
Ni ĉiuj konsentis, ke estus tre bone kaj dezirinde pli bone eluzi la eblecojn kiujn la sociaj medioj ofertas. La iniciaton pri tio faris Heming dum nia unua interkonsiliĝo aŭtuna kaj ni esperas, ke venontfoje kiam li ĉeestos ni povos ekkomenci la laboron kaj ekhavi iun strategion pri agado en *Facebook*.

7. Eventualaĵoj
Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 20:45h.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 30/11 je la sama horo.
Raportis: Mario Machlik